



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 238

Februaro, 2006

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado estas \$8, por Usono \$12, kaj por aliaj landoj estas \$20




VOJAĜU KUN NI

Ĉi-monate ni vojaĝu ĉirkaŭ la randoj de Eŭropo, de la nord-okcidenta Skotlando ĝis la sud-orienta Bulgario. Kun bonaj mapoj, oni povas trovi la menciitajn lokojn kaj sekvi la veturojn de niaj verkistoj. Dum malvarma februaro oni eĉ povas revii pri sia propra somera vojaĝo. Nur samtempe aŭskultu la kanton „Reva vojaĝo”, verkitan de Mikaelo Bronŝtein kaj bele kantitan de Ĵomart kaj Nataŝa. Dankon al Laurinda kaj Lorand pro la artikoloj.

— via redaktoro

KASTELO EILEAN DONAN

Dum nia pasint-somera vojaĝo al Skotlando, mi kaj mia edzo vizitis Kastelo-n Eilean Donan. Eilean Donan (pr. e-lan donan) signifas “insulo de Donan”; Sankto Donan estis ermito kiu loĝis sur la insuleto je la komenco de la sepa jarcento. La insulo troviĝas ĉe la kunveno de tri mar-lagoj (Loch Duich (pr. laĉ DU-iĉ), Loch Long kaj Loch Alsh), ĉirkaŭata de montoj. De la insulo oni povas vidi la faman insulon de Skye (pr. skaj) – kiam ne estas tro da nebulo!



Rigardo al la kastelo. Dank' al clanmacrae.org/documents/ed.htm

La kialo ke la kastelo tie konstruiĝis evidentiĝas kiam oni rigardas tien, kie la insulo troviĝas. Dum la tempo de la vikingoj, tiuj teruraj homoj ofte atakis marbordajn lokojn de Skotlando. La insulo, troviĝanta inter tri lagoj je la eniro de la maro, estis bona defensiva loko. Laŭ mito, la kastelon ekkonstruis juna filo de la klano (familio)

Matheson (pr. MATHesen), pro la ordono de la reĝo, por defendi la lokajn loĝantojn kontraŭ la vikingoj. Poste, la kastelo estis uzita dum konfliktoj aŭ militoj inter la skotaj klanoj. En la 13-a jarcento, la kastelo apartenis al la klano MacKenzie (pr. maKENzi), kiu tenis ĝin dum multaj jaroj, kaj kiu, en la 16-a jarcento, metis la kastelon sub la protektado de la klano MacRae (kiu kromnomiĝis la Korpgardistoj de la ĉefo de la klano MacKenzie). La klano MacRae (pr. maKREJ) gardis la kastelon de multaj atakoj, kiel tio, kio okazis en 1539. La klano Mackenzie, kun aliaj klanoj, kontraŭis al Donald Gorm MacDonald, kiu pretendis la Lordecon de la Insuloj (dum la 13-a, 14-a kaj 15-a jarcentoj, la Lordo de la Insuloj regis la Hebridajn insulojn kaj parton de la okcidenta marborda regiono de Skotlando). MacDonald velveturis al la insulo kun kvindek ŝipoj. La kastelo havis tiutempe nur tri defendantojn. Unu el ili, Duncan MacRae, mortvundis per sia lasta sago MacDonald-on, kaj tiel forpuŝis la atakantojn.

En la 18-a jarcento, okazis ribeloj en Skotlando kontraŭ la brita registaro fare de la jakobistoj, kiuj apogis James Edward Stuart. James estis la filo de James VII kaj II (reĝo de Skotlando kaj Anglujo), kaj la patro de Charles Edward Stuart (eble pli bone konata kiel Bonnie Prince Charlie). James Edward Stuart oni nomis „La Maljuna Pretendisto”, kaj lian filon oni nomis „La Juna Pretendisto.” Ili ambaŭ pretendis la britan reĝecon. En 1719, kvindek hispanaj soldatoj, aliancanoj de la jakobistoj, loĝis en la kastelo kiam alvenis tri anglaj ŝipoj, la Enterprise, la Worcester kaj la Flamborough. La plibone armitaj angloj bombardis la kastelon kaj la hispanoj kapitulacis. La angloj poste tute detruis la kastelon.

Ĝi restis tiel dum 200 jaroj, sed en 1911 ĝin aĉetis Lieutenant-Colonel John MacRae-Gilstrap, kies revo estis rekonstrui la kastelon. Je tiu revo ankaŭ kredis Farquhar MacRae (pr. FARKŭar maKREJ), kiu loĝis proksime. Efektive li diris, ke li vidis „en revo” la kastelon rekonstruata. Kune (sed ne sole, estis aliaj laboristoj), la du homoj rekonstruis la kastelon, elfosante, konstruante, kaj skulptante kun ligno kaj ŝtono. La laboro daŭris de 1912 ĝis 1932, kaj kostis 250,000 pundojn. La kastelo nun estas vere impona, kun muroj foje de dek-kvar futoj je larĝeco. Interese, kvankam la moderna desegno baziĝis sur revo, ĝi pli-malpli kongruas kun malnova plano de la kastelo, farita en 1715, sed ne trovita ĝis baldaŭ antaŭ la malfermo de la rekonstruita kastelo en 1932.

Nuntempe oni povas marŝi super la ponto, kiun konstruis MacRae, al la kastelo, eniri, kaj rigardi montraĵojn pri la historio de la kastelo kaj de la klano MacRae. Oni diras ke la kastelo estas unu el la plej ofte fotografitaj kasteloj en Skotlando, kaj vere, fotografajoj de la kastelo aperas ofte – eĉ en la filmo „Highlander.” Pro tio, mi ne estis certa ke mi volis viziti la kastelon – ankaŭ pro la fakto ke ĝi estis rekonstruita. Mi pensis ke ne estus tre aŭtentika sperto, sed vere, la vizito plaĉis al mi.



Kastelo Eilean Donan. Dank' al ties oficiala retloko.

La dudekjara laboro de Farquhar kaj John MacRae redonas al ni, homoj de la moderna tempo, ion de la pasinteco, sencon de la historio de la loko. Eble ne ĉio estas aŭtentika, sed la kerno de la kastelo ja estis sur la insulo dum jarcentoj. Dum la elfosado, oni trovis restaĵon de fortikaĵo konstruita de la Piktoj (tribo de homoj kiuj loĝis en Skotlando dum fruaj tempoj). Se oni staras sur la ŝtona muro je la supro de la kastelo, kaj turnas sin for de la

moderna aŭto-ŝoseo, kaj rigardas la montojn, la maron, kaj la nebulon, oni ja povas imagi la vikingajn ŝipojn velantajn al la insulo, aŭ la sonon de la sagoj de MacRae kaj MacDonald en la aero. Tio ja estas valora donaco, kaj pro tio mi dankas al la homoj kiuj strebis dum jaroj por sia revo. Tio estas alia kialo ke la kastelo plaĉis al mi -- kiel esperantistoj, ĉu ni ĉiuj ne havas simpatian por tiuj, kiuj dediĉas siajn vivojn por efektiviĝi nekutimajn, sed valorajn, revojn?

— Laurinda Matheson, Nov-Skotio

TRAVIVAĴOJ EN BULGARIO

Mi kaj mia filo Florian multe pripensis, kie estus la plej bona loko por pasigi nian ferion. Vojaĝi en landoj de la Eŭropa Unio estus malfacila kaj multekosta afero. Ni pensis viziti Bulgarijon, kiu estas tre bela lando. Ni provis trovi dokumentojn pri Bulgario, sed ni trovis nek turistan karton nek libron pri ĝi. Finfine ni kontaktis bulgarajn samideanojn kiuj partoprenis la IFEF-kongreson (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio) en Braŝovo en majo pasint-jare, kaj ankaŭ kun la Pasporta Servo.

Mi skribis kaj sendis leterojn kaj ret-mesaĝojn al multaj bulgaraj esperantistoj. Ili tre amikeme respondis al mi. Mi ricevis respondon de Fidaivra Boĉeva (de Plovdivo), Hristo Ignatov (Albena), Dalnazar Krastev (Sofio), kaj Veseline Rambirova. Do, ni decidis viziti Bulgarijon.

Ni komencis nian vojaĝadon la 3an de aŭgusto 2005, veturante per trajno al Bukareŝto, kie ni vizitis la centron de la urbo kaj la parkon „Ĉizmiĝiu”. Posttagmeze ni pluveturis ĝis la banloko Eforie, kie ni tranoktis. Je la 5a de aŭgusto ni ekveturis per trajno ĝis Mangalia, kaj de tie per aŭtobuso ĝis la ruman-bulgara landlimo ĉe Vama Veche. Ĉi tie policisto demandis min: „Ĉu vi vere volas trapasi la landlimon piede?” Poste li demandis sian ĉefon, kiu permesis al ni piede trapasi, malgraŭ ke mi vidis neniun tiel transiri la landlimon al Bulgario.

Ni devis piediri 5 kilometrojn por alveni en la unua bulgara vilaĝo, Durankulak, de kie ni veturis per aŭtobuso ĝis la marborda banloko Albena. Tie ni estis gastigitaj de S-ro Hristo Ignatov, amikema kaj tre afabla samideano. Ni elkore dankas al li pro lia amikeco kaj boneco. Dum tri tagoj ni vizitis la banlokon, kaj ni multe baniĝis. S-ro Hristo Ignatov helpis nin ŝanĝi monon, anoncis niajn samideanojn el Plovdiv, kaj interesiĝis pri nia trajno-ebleco.

La 8an de aŭgusto ni veturis per buso al Varna, kiu estas la „ĉefurbo” de la bulgara marbordo. Ĝi estas granda kaj bela urbo. Ni daŭrigis nian vojaĝon al Plovdiv kaj alvenis post la deka vespere. En la stacidomo ni estis atenditaj de nia samideanino Fidama (Arbido) Boĉeva kaj de s-ro Lazar T. Karakasev, kiu helpis nin tre multe, kondukante nin al la hotelo en la centro de la urbo. En la sekvanta tago s-ro Lazar montris al ni la tre belan urbon. Ni vizitis la centron kaj la malnovan urbon.

Tre interesa estas la historio de la urbo Plovdiv. La unuaj loĝantoj de la urbo estis la Trakoj, kaj ili nomis la urbon „Evmolpias”. En la jaro 342 a.k. Filipo la II-a de Macedonio, donis al ĝi la nomon „Filippolis”. Poste la Romianoj koloniis la urbon. En la jaro 45 Klaŭdius konkeris ĝin. Domiciano modernigis ĝin. En la deka jarcento la lando estis konkerita de caro Simon. En ĉi tiu periodo la urbo multe evoluis. Dum la Bizantia okupado la slavaj loĝantoj estis forpelitaj. Poste, Plovdiv estis okupita de turkoj kaj transformiĝis al komerca centro.

La 9-an de aŭgusto ni jam vojaĝis al la ĉefurbo de Bulgario. En Sofio ni serĉis nian samideanon de la Pasporta Servo, kiu promesis nin gastigi, sed bedaŭrinde, lia telefono respondis al ni nur: „Ne gavaril” (ne parolas). Bonŝance ni havis de nia samideano en Plovdiv la adreson de la hotelo Mistrel. Kiam ni ekvidis la hotelestrinon, ni ekkriis: „Balkano! Balkano!”

Sofio havas sian originalan aspekton, pro malgrandaj kafejoj kun multaj homoj sur la stratoj. Proksime de la ĉefurbo vidiĝas la Vitoŝa montaro. Sofio havas 1,2 milionojn da enloĝantoj kaj estas granda ekonomia, politika kaj kultura centro.

En la traka erao la loko nomiĝis „Terdis”. La romianoj okupis ĝin kaj poste, en la Bizantia erao, la urbo evoluis ĝis la 4-a jarcento. En la 8a jarcento venis la slavoĵoj. En 809 Khan Krum fondis la unuan Bulgaran ŝtaton.

Kelkaj grandaj vidindaĵoj de la ĉefurbo estas: 1) la Katedralo Aleksander Nevski, konstruita en la jaroj 1878-1912; 2) la Preĝejo Sankta Sofio, konstruita en la periodo de Justinian; 3) la moskeo Banya Bashi; 4) la statuo de Sofio; 5) la parlamenta masivkonstruaĵo; 6) la sinagogo konstruita en maŭra stilo en 1909; 7) la monaĥejo Dragolevski, kiu ekde 1345 estis la centro de la bulgara edukado kaj kulturo.

Post la vizitado al Sofio, ni ekveturis al Vidin, urbo kiu situas en la nord-orienta parto de la lando, ĉe la bordo danuba, kie finiĝis nia vojaĝado en la bela lando, Bulgario.

— Lorand Monosi, Oradea, Rumanio